# LA PACDEFENDANTO

N-o. 47 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Novembro 1955.

## NI BONVENIGAS K-don. prof. C. MURGIN EN ĈEĤOSLOVAKIO

Subite nin atingis telegramo el Sofio pri la alveno de k-do. profesoro Canko MURGIN, scienca laboranto en la ekonom. fako de la Karl Marks Institute en Sofio. Post longaj klopodo li fine akiris la "bulgaran permeson" por unumonata studvojaĝo al Ĉeĥoslovakio.

K-do. prof. Murgin estas prezid. de la Esperanto-societo Maksim Gorki en Sofio kaj funkcias ankaŭ en la Centra komitato de la Bulgara Esp-Asocio. Li estas ankoraŭ juna kaj kuraĝa homo. En la unua momento li sukcesis akiri la simpation de ĉiuj esperantistoj en Plzeň, kie li unue haltis en ĈSR. Plue li konsentis viziti la urbojn Praha, Pardubice, Hradec Králové, Brno, Ostrava, Olomouc Přerov, Gottwaldov-Otrokovice kaj Bratislava. K-do. Canko Murgin estas tre entusiasmigita pri la sukceso de sia vojaĝo, kiun li jam de longe sopiris. Li diras, "se mi vidus kaj spertus nenion pli ol tion, kion mi spertis nur en Plzeň, mi estus kontenta". Murgin konferencis kun kult. laborantoj de la Nacia Komitato en Plzeň (urbkonsilantaro), du horojn daŭris konferenco en la Regiona Komitato de la Komunista Partio, kiu havis altan nivelon kaj certe rezultigos multe pli bonan rilaton de partifunkciuloj al nia movado. Tiuj men kontaktigis kdon. Murgin kun divers. fakuloj de la Departementa Nacia Komitato, kiuj lin koncize informis pri la ekonomia situacio en la industrio kaj agrikulturo. De ili li ricevis div. specimenojn de plej novaj inventaĵoj, fotojn k. a. memoraĵojn.

La tradukadon prizorgis k-doj. R. Burda kaj J. Reiser. En la partio kaj ĉie, kie ni konferencis, naskiĝis la konvinko, ke ĉiuj, kiuj ĝis nun asertis, ke Esperanto estas nesufiĉa kaj neperfekta per diversaj rilatoj, grave eraras, ĉar ni flue interkompreniĝis pri teknikaj, ekonomiaj, geografiaj, industriaj eĉ filozofiaj problemoj en serioza diskuto pri Marks-Leninismo kaj lingvistiko.

Merkrede la 2/11. transdonis k-do. Canko Murgin la salutojn de la bulgaraj esp-pacdefendantoj kaj ankaŭ tiujn de la rumanaj kaj hungaraj gekamaradoj, kun kiuj li renkontigis dum la travojaĝo al la esperantistoj en Plzeň. Grandan aplaŭdon rikoltis k-do Murgin, kiam li informis la ĉeestantojn pri la gravaj sukcesoj, kiujn atingis la bulgaraj esp-istoj ĝis nun sur la vojo "Per Esperanto por la Mondpaco!" Ĵaŭde la 3.de nov. okazis publika prelego de C. Murgin pri socialisma konstruado en Bulgario kaj ĝia batalo por la paco. Ĝin aranĝis la Esp-rondeto en Plzeň, la sindikata kult. klubo de Lenin-uzinoj (antaŭe "ŠKODA") kaj la Distrikta Packomitato. Ĝi prelegon anoncis 200 bele presitaj afiŝoj, la urba kaj diversaj uzinaj radiodisaŭdigoj. Bedaŭrinde pro la tro limigita tempo (apenaŭ 2 tagoj) da organizeblecoj, la prelegon vizitis ne pli ol 70 personoj, inter ili plejparte esperantistoj.

Lerninte el tiuj spertoj, ni tuj informis la ceterajn interesatajn rondetojn, kiujn k-do Murgin vizitos kaj sendis al ili precizan vojaĝ-planon, por ke ili sciu lian alvenon kaj havu sufiĉan tempon por la preparoj de kunvenoj kaj prelegoj.

K-do. Murgin fakte tre efike helpas al nia movado kaj ni devas esti tre dankemaj al li por la granda oferemo kiun li alportis por la vojaĝo al Ĉeĥoslovakio. Dependas nun sole de niaj rondetoj, kiel ili kapablos eluzi la ĉeeston de k-do. C. Murgin por fari kiel eble plej efikan propagandon por nia movado.

Ni esperu, ke post la renkontiĝo kun eksterlandaj gekamaradoj dum nia TUTŜTATA, la renkonto kun k-do. profesoro Murgin el Sofio donos al nia movado la duan venkan majloŝtonon, se ni sukcesos ĝin bone kaj lerte plene eluzi.

Rud. BURDA.

VENKE PROGRESAS ESPERANTO EN SOVJET-UNIO.

En la Lingvoscienca Instituto de la fama Scienca Akademio en Moskvo jam funkcias Esperanto-rondeto gvidata de prof-ino Majtinskaja. La unuan lecionon malfermis vic-direktoro de la Instituto k-do. E. A. Bokarev. Ĝin partoprenas cirk. 20 sciencaj laborantoj kaj aspirantoj de la Instituto.

En murgazeto de studentoj en la Moskva Universitato aperis granda artikolo pri utiligo de Esperanto en la Tutmonda Festivalo de junularo kaj studentoj okazinta en Varsovio, verkita de studentiro L. Bokareva.

La 20. de okt. prelegís k-do. E. A. Bokarev en la Leningrada Domo de scienculoj pri Esp-o kaj ties utiligo por la Mondpaca movado. La prelego estis tre favore akceptita de la aŭskultantoj, kaj proponita fondo de Esp-rondeto.

En oktobro fondiĝis plua Esperanto-rondeto ĉe la Filologia Fakultato de Moskva Universitato partoprenas pli ol 20 studentoj.

Mi petas pardonon de ĉiuj gek-doj, kiuj skribis al mi. La nombro de ricevitaj leteroj jam estas pli ol 300 el ĉiuj landoj. Pro troa okupiteco mi ne povas respondi al ĉiu. Eble pli malfrue. Same mi dankas al ĉiuj gek-doj por la novaj sendaĵoj, de Esp-revuoj, kiuj multe helpas al nia laboro.

E. A . BOKAREV.

JUNULARA ESP-MOVADO EN D.D.R.

Lastatempe ankaŭ ekvivis la jun. Esp-movado en DDR. La 29. de oktob. kunvenis en Königstein ("Saksa Svisio") junaj esp-istoj el ses urboj de la: Germana Dem. Respublíko. Oni diskutis pri la estonta junulara movado kaj internacia korespondado. Inter aliaj kantoj eksonis ankaŭ la ĉeĥa kanto "En Junulara Rond", kiu tre plaĉis al la germanaj junuloj. Tiun kanton ili ripetis ankaŭ rekte ĉe la ĉeĥoslovaka landlimo en la espero, ke ĉeĥaj amikoj aŭdos ĝin. Estis domaĝo, ke la Germanoj ne povis paroli kun Ĉeĥoj, ĉar inter ili ne trovigis esperantisto.
Ni decidis baldaŭ denove kunveni.

Giso BROSCHE
PIRNA -D. D. R.

NIA HUNGARA MOVADO KRESKAS

Kun sincera ĝojo mi raportas al vi, ke en nia urbo ekfunkciis "PACO" Esperanto Rondo en la kadro de la PETÖFI KULTURDOMO. Nia rondo laboras por paco kaj kulturo per Esperanto.

Ni partoprenis ekspozicion de la Petöfi Kulturdomo kun aparta Esp-angulo. Sur la muro troviĝis la devizo "PER ESPERANTO POR LA PACO!" Eszperantó-val a Békéért!" dulingva. Ni ekspozicíis materialon el Moskvo, Praha, Varsovio, Parizo, kíujn ni akiris per Esperanto. Vian belegan landon ni montris sur kvar kvádratrnetroj kaj faris bonan propagandon por viziti ĝin.

La 30. de decembro 1935 niaj hungaraj esp-pacdefendantoj aranĝos "pacvesperon". Bonvolu al ni sendi leterojn, bildkartojn afíŝojn kaj alian materialon pri via paclaboro por aranĝi ekspozícion. Al ĉiu ni nepre respondos.

Adreso: PACO-ESPERANTO RONDO, Petöfi Kulturdomo, HODMEZÓVAS-ÁRHELI,
Hungario. Francisko DÉTÁS
sekretario

IMPRESA SALUT -LETERO

Okaze de la 36a datreveno de la Granda Oktobra Socialista Revolucio nia redakcio ricevis salutleteron de hungaraj gek-doj el urbo Hodmezovásárnely subskribitan de ties prezidanto k-do. Francisko GZAPOLAY kaj multaj aliaj esp. gek-doj por transdoni ilin al niaj legantoj.

GAZETPROPAGANDO

Pola gazeto, organo de la Nacia Fronto "GTOS ZIEMI CIESZYŇSKIEJ publikis la 15. de nov. anoncon de k-do. ing. Glajcar pri Esperanto-kursoj kaj kunvenoj en urbo Cieszyn en Kultura Domo.

10 JAROJ – TUTMONDA FEDERACIO DE DEMOKRATA JUNULARO (TFDJ)

Kian la dua mondmilito finiĝis, progresemaj junular-organizoj de multaj landoj proponis fondon de Internacia federacio da tutmonda demokrata junularo. Ĉi ideon oni aprobis ĉie. Somere 1945 kunvenis preparkomitato en Londono. Ĉiokaze landaj konferencoj kaj amasaj kunvenoj de junularo elektis siajn delegitojn por la unua junulara mondkonferenco.

La unua monda korferenco okazis la 29. de okt. 1945 en Londono. Ĝin partoprenis 1437 delegitoj kaj 148 observantoj, kiuj reprezentis pli ol 30 milionojn da gejunuloj el 63 landoj.

Ĉe malfermo de la konferenco aperis sur la tribuno delegito el Trinidado, la Negro Connor, kaj alvokis ĉiujn ĉeestantojn por defendi pacon kaj plifortigi la demokratan unuecon. "Ni batalos en la tuta mondo por unueco de la junularo, sincera amikeco inter la popoloj, por justa kaj daŭra paco. Ni proklamas labori por tio per nia juneca entuziasmo kaj viglaj manoj" – estis la ĵuro de la junuloj ĉeestintaj.

La Londona Konferenco pritraktis tri aferoj: la batalon de la junularopor libereco kaj paco, postmilitajn bezonojn de la junularo kaj organizadon de ĝia internacia komuna agado.

Okaze de tiuj pritraktoj fondiĝis la tutmonda federacio de demokrata junularo (TFDJ). Estis decidite de tempo al tempo aranĝi grandajn pac-renkontiĝojn por interkonatiĝi kaj pli profundigi la reciprokan amikecon.

De tiu tempo jan pasis pluaj renkontiĝoj de TFDJ, – en 1947 en Praha, en 1949 en Budapeŝto, en 1951 en Berlino, 1953 en Bukaresto kaj la lasta, la 5a Festivalo de junularo kaj studentoj estis en Varsovio en 1955. Tie kunvenis gejunuloj el 114 landoj, okazis 547 koncertoj kaj artprogramoj, estis prezentitaj 116 filmoj el 25 1andoj. En la kadro de la Festivalo renkontiĝis filatelistoj, studentoj, esperantistoj kaj diversaj grupoj. Krom tiuj renkontiĝoj TFDJ partoprenis laboron de UNESCO en 1954 en Montevideo. Ĝia delegitaro vizitis Hindion kaj Ĉinion por instigi la junularon al paco kaj amikeco inter la popoloj. Dum dek jaroj TFDJ laboris bonege kaj ĝia laboro dokumentas, ke tiu ĉi granda mondorganizo iras la ĝustan vojon, pri kio ĝi povas fieri.

La 10. de novembro ni festas la 10an datrevenon de la fondiĝo de Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo. Kun ĝojo ni rigardas la grandajn sukcesojn de la popoloj kaj gravan mildigon de la internacia streĉiteco.

Gejunuloj de la tuta mondo! Ni vokas vin, helpu la plifirmigon de la paco, per reciprokaj amikaj vizitoj, aranĝo de kulturaj kaj sportaj festoj de internacieca karaktero!

Ni klopodu, ke nia bona ideo venku en ĉiuj landoj! Ni ripetu la ĵuron, ke nia junularo batalos prr ĉiuj fortoj por internacia unueco, plibonigo de junulara vivo, firmigo de internacia solidareco kaj daŭra paco en la tuta mondo!

IMRE FERENCZY
Junular-referanto de la Hungara Esperantista Konsulta komitato en Budapeŝto.

Ĉiuj hung. esp-istoj ligu kontakton kun la "MEM"-peranto, k-do. p. BALKANYI, MAG. NEMZETI BANK, Fiokiroda, BUDAPEST-54.

LA BULGARAJ ESP-ISTOJ PROGRESAS

La Esp-societo "RADIO" en PAZARĜIK malfermis kurson por progresintoj, kiujn gvidas k-do N. Cireanov. Kunveroj estat ĉiumerkrede en la klubejo de la 18 horo. Funkcias 2 propagandaj vitrinoj kie estas ekspoziciata materialo el eksterlando. La 20. de nov. malfermiĝos senpaga kurso por komencantoj. La 20. de dec. ni projektas "Tagon de Esperanto-libro!", kiu eliminus en abunda ekspozicio de Esp-literaturo, gazetoj, cirkuleroj ktp. La 15. de aprílo 1956 ni prepsras Jubilean Amuzan Letervesperon . Por ĉio ni bezonas vian materialan helpon.

L. LEVIĈAROV, Jurdan Nenov 13, PAZARĜIK, Bulgario.

DEKJARA JUBILEO

La Asocio de Esperantistoj en Polio festas la 22an de novembro sian dekjaran ekziston. Kun kontento ni konstatas, ke kvamkam ĉi asocio longan tempon stagnis, fine ĝi tamen trovis la novan vojon al aktiva laboro helpante per Esperanto al la mondpaco. Multaj ĝiaj sekcioj kaj speciale tiuj en urbo Vroclav kaj Krakovo jam tre aktive laboras. Grave al tio kontribuis la nunjara aranĝo de Junulara Festivalo en la pola ĉefurbo Varsovio kaj ne pli malmulte la aktiva laboro kaj la sukcesoj de Esperanto en la ceteraj Popoldemokratioj kaj Sovjet-Unio.

Okaze de tiu ĉi festo ni deziras al la Pola Esperanto Asocio multan sukcosen kaj la finan venkon de nia movado ne nur en Polio, sed en la tuta mendo dum ĝia estonta dekjara agado.

NOVA "MEM"-PERANTO EN VIETNAM

K-do. Nguyěn-Văn-KINH, 2 Ly thuong Kiet, HANOI, Vietnam, akcentis la funkcion de peranto de Mondpaca Esperantista Movado por Vietnamo. Samtampe li promesiss reorganizi la Esp-movadon em Vietnamo surbaze de nia devizo: "Per Esperanto por la Mondpaco!" Ĉiulandaj gekamaradoj laŭeble helpu al nia nova peranto peralsendo de diversspeca propaganda materialo kaj kuraĝigaj instigoj, starigi ankaŭ en Vietnamo fortan sekcion de nia monda movado.

LA EKONOMIA SITUACIO USONA

(El letero, kies aŭtoron ni ne povas publike mencii)
.... mi varmege amas la landon, kie mi vivas jam pli ol 30 jaroj kaj kie mia filino kaj genepoj naskiĝis, sed ne forgesu, ke mi ne povas esti blinda ŝovinisto, nevidanta la makulojn kaj mankojn de nia usona lando. La usona popolo ne estas respondeca por tiuj mankoj kaj makuloj, sed la egoistaj kaj senkonnciencaj gvidantoj. La vera situacio de usono estas sekvanta:
Ne la 160 miliona popolo mastrumas Usonon, sed nur 59 riĉegaj familioj. La membroj de Morgan, Rockefeller, Nelon kaj aliaj. La tiel nomataj rabistaj baronoj. La ĉefoj de la miliarduloj, la dolar-reĝoj. Antaŭ 20 jaroj unu el la plejbonaj bonaj prezidantoj, Franklin Delano Roosevelt petis la Kongreson (parlamtento), ĉar unu triono de la usona popolo suferas, nehavante sufiĉan monon por siaj familioj por manĝado, vestaĵo kaj loĝejo:

"Sinjoroj! Ne helpu nur la mon-avidajn, sed helpu ankaŭ la mizerulojn!"

La leĝoj plejparte ne helpas la usonan popolon, sed la riĉegulojn, la monopolistojn kaj la superhavantajn korporaciojn (verŝajne potenchavantoj). Potencaj monopoloj havas la registaron en siaj manoj. Ili pagas al la laboristaro nur tiom, ke ĝi vivaĉas, mizere vivas.

La laboristaro havas ankaŭ aristokration. La plejmulto de laboristoj en Usono ne havas salajron de 2.000 dolaroj por jaro, kaj tiu ĉi sumo ne sufiĉas por vivi. Famaj ekonomiaj profesoroj konstatis, ke necesas por unu usona familio por vivi malaltan standardan vivon almenaŭ 3-4.000 dolaroj po jare. En la "lakto-ĉielo" la fekunda lando Kánaán en Usono estas tre multaj-almozuloj kaj mizeruloj. Mi estas okupala kiel oficisto, proksime de la tiom konata "Fifth Avenue", 1a plej riĉega parto de New York. Kiam mi iras al mia laborejo, multaj almozuloj petas almozon. Sur la stratoj tie multaj kripluloj vendadas krajonojn kaj aliajn aĵojn por cendoj (monero). Malriĉaj geviroj violonludas ĉe la anguloj por ricevi almozon. Tio montras, ke ne la tuta Usono estas feliĉa. Mi ofte trovas elmetitajn meblojn antaŭ la domoj, kiujn la policio tien transportis, ĉar la patrono de la domo elpelis la malriĉajn loĝantojn.

Mi povus priskribi multajn longajn okazintaĵojn. sed mi devas ankaŭ ion skribi pri la "tiel famaj usonaj filmoj". Pli ol 80% de la usonaj filmoj estas malbonaj. Ili montras la luksan vivon kun mensoga kaj hipokrita moralo. Senhonorige, hontinde ili falsigas la historion por la interesoj de la riĉega klaso. Kun mia edzino mi spertas tion ne nur en kinejoj, sed ankaŭ hejme ĉe la televid-aparato. Ĉion, kion ni vidas, estas mensogo. Ili deziras edukadi la amasojn en la intereso de la monopolistoj kaj riĉeguloj. Eble vi jam legis pri la terura vetero en Usono, la detrua uragono. Ĝi faris bilionojn da domaĝo. En infana kampo la torento de uragano mortigis kvindek dormantajn

infanojn. La plej reakciaj gazetoj mem konfesis, ke la ŝtato estas kulpa, ĉar Usono ne havas inundan kontrolon. Usono havas trilionojn por atom- kaj hidrogenbomboj, sed ne havaa monon por kontroli inundon. La kongreso forgesas doni monon por savi la vivojn de mil kaj mil inunditaj infanoj kaj geviroj. Prezidanto Eisenhower dramatike oferis 3-4 cent milionojn da dolaroj. Tio estas nur gut -kvanto. La mizero estis terura en la inundita teritorio.

Tia estas la vivo en nia tre feliĉa Usono». . . .

X.X.-N.Y.

LA 42a KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ

okazinta ĉe Kansai Universitato en Semrijama, Suita, Osaka-gubernio finis kun granda sukceso. Partoprenis 160 esp-istoj el ĉiuj lokoj de Japanio. La programo konsistis el organiza, instrua k. amuzaj partoj. Okazis multaj fak-kunvenoj, inter ili ankaŭ de "MEM". Gravan rolon ludis prelego pri atombombo, kiu finis per la kanto "Ho, L'atombombon ne lasu plu ni"

Masao MIJAMOTO

LA 41a UNIVERS ALA KONGRESO

de esperantistoj okazos dum 1956 en Kopenhago (Danlando). Ankoraŭ ne estas konata ĝia preciza dato.

RAPORTOJ PRI LA VIZITO DE PROF. C. MURGIN EN ĈSR

Prof. C. Murgin atingis la 11an de novenbro akompanata de k-dino el Pardubice la urbon Hradec Králové. Vespere estis prelego "Bulgario nia aliancano" en la domo de la armeo. Kron esp-istoj ĉeestis ankaŭ soldatoj kaj medicinistoj. Sabate la 12. C. M. akompanata de k-do Zd. Hršel, vizitis la prezidanton de la Nacia Komitato (urbestro) k-don. J. Lhoták, kiu lin tre afable akceptis kaj invitis lin al rondvojaĝo per aŭtomobilo tra la urbo. K-do Murgin vidis fabrikojn, popol. observatorion, lernejojn kaj aliajn vidindaĵojn de Hradec Králové (novajn kvartalojn, Blankan Turon). Estis ligita tre sincera rilato. La urbestro konvinkiĝis pri la graveco de Esperanto. Li persone ordonis, ke la urba radio 4foje anoncu la vesp. prelegon de k-do. Murgin. Sabate posttagneze transdonis k-do Murgin en plena teatrejo salutojn de bulgaraj pioniroj al kunveno de ĉeĥaj pioniroj. Samtempe ligiĝis peresperanra kontakto.

K-do prof. C. Murgin en Brno

La 15/11. vizitis C.M. la Nacian Komitaton de Brno, la estraron de la Komunista Partio, profesoron Trávníček kaj aliajn aŭtoritatojn. Ĉie li estis kun sincera amo akceptíta. Morgaŭ la Distrikta Nacia Komitato per aŭtomobilo veturigos k-don Murgin tra la urbo, per montri al li ĉiujn vidindaĵojn. En la Regiona Nacia Komitato li ricevis libretojn pri la ekonomia planado En la Komunista Partio oni promesis fondi rondeton do esp-komunistoj. La fama profesoro Trávníček proklamis, ke siatempe li ne estis atakanta Esperanton, kiun li trovas bela internacia lingvo, sed nur la esperantistojn, kiuj ĝin misuzas por kosmopolitaj celoj. Post prelego en agrikulttura altlernejo k-do. Murgin ricevis multajn demandojn. C. Murgin proklamis, ke ĉiu plua urbo, kiun li en ĈSR vizitas, des pli plačas al li, kaj promesas doni detalan raporton pri siaj impresoj post kiam li revenos al Bulgario.

Li intencis ankaŭ viziti la slovakajn urbojn Žilina, Trenčín, Martin, Bratislava, kaj en Moravio, Karviná, Třinec kaj Opava, eble ankaŭ Kopřivnice.

KION RAPORTAS MURGIN AL PLZEŇ

... Ĝis nun mi vizitis kromvia urbo ankaŭ Praha (bedaŭrinde de tie nia re. ankoraŭ ne ricevis raporton), Pardubice, Hradec Králové, Kladno kaj ĉi-matene mi veturos plu al Brno. Ĝis nun mi ne faris ian ajn ŝanĝon en la vojaĝprogramo, kiun ni decidis en Plzeň kaj mi ne intencas ĝin rompi dum mia restado en via lando.

En la fino de mia vojaĝo certe mi sendos al vi tute detalan raporton. La sciojn kaj konojn, kiujn mi

akiris ĝis num el geografia vidpunkto, tre utilos al mia estonta laboro en mia fako. En Pardubice mi ricevis oficialan apogon de reprezentantoj do popola aŭtoritato, k-do. Polák en Pardubice kaj en Hradec Králové ĉe la prezidanto de la Nacia Komitato, k-do. Lhoták, kiu persone aŭtomobile veturigis min de fabriko al fabriko kaj ceteraj vidindaĵoj. Publika kunvero kun filmstrio pri partizanaj bataloj en Bulgario havis grandan sukceson. Kiam mi iros al urbo Brno, mi dum unu tago vizitos Blansko, el Olomouc mi iros al Kopřivnice, el Ostrava al Opava kaj Karviná sen ŝanĝo de mia vojaĝplano. Ĉar la gek-doj invitis min viziti ankoroŭ pluajn slovakajn urbojn, mi verŝajne okaze de nia vizito en Bratislava venos ankaŭ al Martin, Trenčín ktp.

Montriĝas, ke la "MEM"-aparato bone funkcias.

Canko MURGIN

ESPERANTISTAJ OFICIROJ PARTOPRENIS LIBERIGON DE D. D. R.

Mi atente legas "L.P.", kiun vi afable sendas al k-dino. E. Michel (ankaŭ mi pro tio, multe dankas). Mi celas vian alvokon en okt. n-o., sed ĉar mi momente ne posedas la adreson de k-do. Bokarev, mi skribas tion al vi:

En la jaroj 45-46. mi amiko pli ofte paroladis kun tiama oficiro de sovjeta armeo, k- do. Anatol VOLOCHOV, plant-biologo en uzino de Moskvo, lian adreson mi ne plu povas trovi. La nomita estis konvinkita s-ano el jaro 1920. Ankaŭ kolonelo kaj tiama urba komandazo ĉi tiea estis esperantisto.

F. KOBLISCHKE Lutherstr. 17. D.D. R. WITTENBERG

Rim. de red.: estus necese, ke la moskvaj gek-doj serĉu tiujn ĉi esperantistojn por ligi kontakton.

PLI VIGLA INTERESO EN FINLANDO

Post eldono de finlanda "PACO" la oficiala organe de "MEM", nia peranto, k-do Baavo HEIKKINEN petis financan helpon ĉe diversaj organizoj kaj ankoraŭ ĉe la Finlanda Packomitato. La lasta donacis sumon per kiu oni povis 1/5. de la preselspezoj post longa rifuzo ankaŭ la organo de finlandaj pacdefendantoj "TANAAN" (Hodiaŭ) publikis sufiĉe longan artikolon pri la valoro de Esp-o, la Esp-pacmovado kaj la finlanda Esp-movado. La rilatoj kun nia landa pacmovado fariĝas pli facilaj post tio.

Niilo KAVENIUS

LA HUNGARA RADIO PRI ESP-O

Antaŭ 14 tágoj la hungara radio denove elsendis en sia porfinlanda relacio raportojn pri Esp-o en Hungario responde al demandoj de finlanda k-do. P. Heikkinen.

La esperantista pacrondo de la Kulturdomo en urbo Hódmezövásárhely aranĝas sian unan Leter-vesperon la 30.an de decembro 1955. Bonvolu sendi multan materialon kiun oni rekompencos. La menciita adreso sufiĉas (aldonu: Hungario!)

"INFANOJ EN LA MONDO"

La redakcio de HEIBONSYA en Tokio, kiu prenis sur si eldoni volumaron de infanaj raportoj, rakontoj kaj desegnaĵoj el la tuta mondo, jam kun bona sukceso aperigis kelkajn alilandajn volumojn. Nun ĝi preparas la volumon de Orient-eŭropaj infanoj, kiu enhavos ankaŭ ĉeĥoslovakan parton.

Por povi doni efektivan bildon pri la vivo kaj pensado de niaj infanoj, la redakcio bezonas ĉirkaŭ mil infanajn verkojn. La plej realaj kaj plej bonaj aŭtoroj ricevos premion.

La temoj, pri kiuj la infanoj rakontu, estas liberaj, sed tamen 1a redakcio preferas jenajn:

l) pri vivo de laboristoj,

2) vivo de kamparanoj

3) la vivo en la urbo, en lernejo, kiel ni ludas ktp.

4) Kion mi memoras el la milito. La infanoj ne verku kun helpo de maturaj homoj, sed laŭ sia propra sperto, vido kaj sento tute libere.

Ĉar la Orienteŭropa volumo eldoniĝos en marto, estas necese, ke vi jam nun zorgu pri ĝustatempa alveno de viaj kontribuaĵoj. Ĉiuj verkoj povas eati en nacia lingvo kun aldono de Esp-traduko.

La materialon vi povas sendi al nia redakcio kaj ankaŭrekte al la redakcio "Infanoj en la mondo" ĉe redakcio de HEIBONSYA, No 4 , Yonbanuiyo (Kozinatti)/Tiyodaku, TOKIO

M. Sakai

## V O R T O J D E P A T R I N O

Japana rigardo de MINATONO Kijoko

Fratinoj kaj fratoj, en kiu on de nia diskuto dum tempeto akceptu malfortajn voĉojn de l' patrino:
Ne, ne povis krii ec nure malforte
la patrino de HIROŜIMA, kiu estas nur kadavro.
La karno ŝiriĝis, la haŭto difektiĝis kaj la okuloj blindiĝis,
sed la patrino eltenis sian doloron.
La harojn deŝirite, la vizaĝon disigite,
eĉ ĉiun sian parencon forrabite,
tamen en ŝia utero ĝermis nova vivo.
La tero estis kovrita de flamo el homoj.
El kriegoj, ĝemegoj kaj ŝlimo
eltreninte sin la patrino apenaŭ postvivis, ĉar esperis ŝi al la estonto
Sed la espero rompiĝis. -
Ve, la kapo de l' bebo (infaneto) ŝrumpis triangule
kaj ĝiaj pupiloj laktokolore maldiafanis.
La patrinoj de HIROŜIMA unuj post aliaj
naskis aŭ kriplan aŭ mortintan.
Dum kiom da jaroj rigardadis ilin la patrino trans la kordoloron!
Al ŝiaj okuloj denove nun speguliĝas stranga ombro de la, polvo de l' morto.
Ŝi suspektis la ombron, ĉu sonĝo pro sia furioziĝo.
Ŝi certigis la polvon dufoje, trifoje sur sia haŭto.
Kun pluvo de la fiŝistoj surŝutitaj per polvo apud BIKINI nia pluvo parencas
Kun la malsanuloj de l'polvo sur la M-insularo, nia sango parencas.
Ne plu la tagon de HIROŜIMA en Japanio!
Sur la brusto de l'patrino tiel dezireganta
ankoraŭ ne ĉesas falado de la polvo de l'morto.
La polvo kune kun la vento kaj pluvo
faladas senĉese sur la infanojn kaj herbojn florantajn
La birdetoj la plumojn estas bruligitaj.
La vasta maro senlime estas malpurigita,
Nun la unuan fojon la patrino de HIROŜIMA jam sentas profundan indignon
Jam pro la polvo de l'morto ŝiaj lipoj putriĝas,
ŝiaj larmoj elsekigas.
Nun ŝi penas kolekti apenaŭ restantan movforton en sia animo,
kaj tremetas pro la indigno.
Kvankam la kadavro de l'patrino leviĝas,
tamen la voĉoj kaj figuro ne povas atingi al la koroj vivantaj!
Do, la patrino disŝirinte sian haŭton, karnon, oston kaj sangon putriĝintajn de l'polvo
surmetas ilin sur la nubojn, enmetas en la nebulon,
tiele ŝi vagadas tra la mondo
ĝis kiom la polvo de l' morto tute elĉerpiĝos!
Fratinoj kaj fratoj, ne turnu flanken la pensojn!
Nun,
kiam momenton post momento

la patrinoj en la mondo fingrojn de l'beboj
ĝoje certigas unu kaj du . . . .
tiam momenton post momenton
la patrinoj kaj la infanoj estas lasitaj sub la polvo de l'morto!
Fratinoj kaj fratoj, ne fermu la orelojn!
Sur la muro malantaŭ vi, sur la plafono super via interparolado
raŭke tumultas la figuro de l'patrino!
Fratinoj kaj fratoj ne deturnu viajn vizaĝojn!
flirtas kaj tumultas . Esperantigisí k-dino KILA Satori
En tiu ĉi jaro kaj jaro 1955, amaso da japanaj patrinoj
amaso da kadavroj de l' patrinoj – flirtas kaj tumultas!

Esperantigis: k-dino KITA Satori

(Kopiita el "ĈEKITO", organo de Jap. ESPERANTISTA VIRINA ASOCIO (EVA)

NOVAĴOJ EL HUNGARIO

.... Esp Konsulta Komitato ... la 13an de novembro en ..... En la lando funkcias 5 Esperanto-rondetoj kaj 3 novaj estas projektataj. En gimnazio de Vasvár prof. d-ro J. Kondor organizas en la kadro de Junularn Societa Laboro Esperanto-rondon, al kiu la Ministerio por Instruo jam donis permeson. La Hungara Instituto por Kulturrílatoj aprobis la agadon de la Komitato, kio donas esperon elsendi delegitojn al eksterland. Esp-aranĝoj. Tri provincaj instruistoj instruas Esp-on al komencantoj. En Hodmezovásárhely nia Esp-pacrondo aranĝis ekspozicion sub la devizo "PER ESPERANTO POR MONDPACO en la kadro de ekspozicio de la loka Kulturhejmo, kun bona sukceso. La rezulto estis, komenco de Esperanto-kurso. La revuo de la nomita Kulturdomo publikas regule hungar- kaj Esp-lingvajn artikolojn. Uzina gazeto de budapesta teksaĵfabriko publikis raporton pri la fondiĝo de Esp-junulara rondo. La ĵurnalo de la Csepel-distrikto raportis pri la budapesta Esperanto-rondo 'PACO' kaj pri la Mondpaca Esp-Movado. En tiu Pacrondo kunvenas regule 40-50 gek-doj. Ankaŭ hungara karikatur-gazeto publikis Esp-relaciojn. La provincaj esperantistoj ricevas ĉiu monate maŝin-skribitan informilon pri nia movado. Tiu ĉi estas kopiata kaj plu disvastigata. Eble baldaŭ la landa komitato sukcesos eldoni hungar-lingvan bultenon. Okaze de la "Okt. Revolucio" la Esp-rondo en Budapest aranĝis festvesperon dum kiu parolis redaktoro de gaz. "UJ VELÁG" kaj k-do. J. Baghy prezentis dokumentan filmon pri la sovjeta kaj hungara revolucioj en 1917-19. Nia festo estis anoncita en la programo de la Kulturjejmo. La 22. de sept. estis lumbildparolado de k-do. E. Veró antaŭ 70 ĉeestantoj en Kult-domo de Budapest pri la Esp-movado. En antaŭurba fabriko malfermis kurson k -do J. Baghy, kiun gvidas I. Egervári. En la 11a distrikto de Budapest la urbkonsilautaro aprobis fondon de Esperanto-rondo kaj kurso. En la urbo Miskolc parolis k-do Temesi kaj d-ro. Gyuri-Nagy pri "MEM" kaj la valoro de Esp-o en publika packunveno .

Pál BALKÁNYI

C. MURGIN EN PRAHA

Ankoraŭ anta la redakcia fino venis sciigo de k-ado Ota GINZ el Praha, kiu diras: ... Ni vizitis gravajn lokojn, ministeriojn de Kulturo kaj de Instruado, Akademion de Sciencoj, altan Ekonomian Lernejon k. a. Ĉie estis farita bonega propagando. Murgin ankaŭ renkontiĝis kun eminentaj ĉeĥaj fakuloj, kiujn li jam parte ekkonis en Bulgario. Kompreneble, ankaŭ li prelegis en la Esp-kludo de Praha kun bona sukceso.

LA RAPORTOJ DE BRNO DIFERENCIĜAS

Sur paĝo 5a de tiu n-o ni citas la raporton de k-do Jos. Ballay el Brno pri la renkonto de k-do. Murgin kun prof. Trávníček. Sed en rap. kiun ni ĵus ricevis de k-do. Vondroušek el la Esp-klubo, tiu

diras, . . . sekvis vizito al rektoro Trávníček, Profesoron Murgin akompanis s-anoj Ballay kaj Vondroušek. Okazis tre vigla diskuto, en kiu rekt. Trávniček parolis ruse (kaj ĉeĥe), prof. Murgin esp-e kaj ruse. Interpretis s-ano Vondrousek. La interparolo, kvankam en momento tre streĉa kaj kriza, estis en amika tono. Rektoro T. havas nenion kontraŭ Esperanto kiel HELPA LINGVO. Li ne volas malutili al Esp-o. Li rifuzis jam multajn proponojn skribi kontrarŭ ni. (Sed ni ne volu, ke li lernu ĝin, li havas multajn aliajn interesojn). Memkompreneble, li estas nur por la rusa lingvo, lingvo de socialisma kulturo de la plej granda nacio ktp. Mi akcentas, ke la diskuto estis vigla, ĉiuj vigle partoprenis kaj poste okazis kora adiaŭo, ĉe kiu rektoro T. dezirís al k-do. Murgin multajn sukcesojn en la poresperanta laboro."

Ambaŭ raportoj estas certe gravaj, sed ni dezirus, ke tiu de k-do. Ballay estu fakta, ĉar tio povas al ni promesi, ke prof. Trávníček, jam ŝanĝis sian opinion kaj ĉesos servi al la malamikoj de Esperanto.

Rud. BURDA

PORPACAN ESPERANTO POŜTKARTON

eldonita en Bulgario, vi povas aĉeti ĉe nia redakcio por Kčs 0.40. Ankaŭ poŝtkarton de "MEM" por la sama prezo. Ni ekspedas po 10 pecoj por 4. -Kčs, inkluzive poŝtafranko.

## L A M O V A D O E N Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

HRADEC KRÁLOVÉ: ni ŝanĝis nian klubejon en la stacidomo por bela, lukse ekipita en la Domo de Armeo. Funkcias kurso por komencantoj, kiun gvidas prof. M. Lukáš kun 22 lernantoj. Ili estas plejparte junaj kaj ŝajnas, ke ili restos fidelaj al nia movado. En la industria lernejo fondiĝis 10membra rondeto sub gvido de k-do. Eisenreich. K-do. Zd. Hršel inistruas al 8 studentoj de medicino ĉiu merkrede de la 14 h. Okaze de vizito de prof. Murgin venis al nia klubo ankaŭ eksterurbaj gastoj, inter ili k-do. Pytloun el Poděbrady kaj d-ro. Fousek el Přelouč. Amika klubvespero daŭris ĝis noktmezo. Matene ni akompanis k-don Murgin al Pardubice, dekie du k-inoj veturis kun li ĝis Brno.

BRATISLAVA, la 26. ni preparas publikan prelegon de k-do. C. Murgin.

POPRAD, kvankam la rondeto bone laboris sub proteklo de Kleriga Dorno ĝi estis subite likvidita. Ĝia estraro skribe protestis ĉe diversaj instancoj. Ankaŭ k-do Burda, prezid. de "MEM" intervenis ĉe la kultura fako de la Nacia Komitato kaj partia komitato en Košice kun necesaj klarigoj. En la nomo de TKKE intervenis k-do Jos. Vítek kaj laŭ liaj informoj la aferotrovis positivan solvon pere de ministerio por kulturo en Bratislava.

OTROKOVICE, nia rondeto aranĝis novan kurson kun 5 komencantoj k. 4 progresintoj. Instruas k-inoj Evjáková kaj Matušová.

PODĚBRADY, la 18. de okt. ni aranĝis la unuan poresperantan vesperon. Prelegis lernejdirektoro k-do Nozar. K-do Pytloun prezentis la unuan Cseh-metodan lecionon post kiu 7 interesuloj tuj aliĝis kurson. Inter ili estas kuracistino. La plej juna estas10jara, la plej aĝa 70jara. La duan lecionon jam ĉeestis 15 lernantoj. La rondeto aranĝas belan ekspozicion en butika montrofenestro. Kunvenoj ĉiu ĵaŭde vespere en la Distr. Popola Biblioteko. Gastojn ni kore bonvenas.

TRENČÍN, regulaj kunvenoj okazas ĉiu ĵaŭde en Domo de Kulturo de 18 ĝis 20a horo. La oficiala organo de Tutŝtata Konsulta Komitato Esp. ĉesis aperi pro financaj malhelpoj (temas pri "NIA SPEGULO" eldonita de k-do Lamačka en Trenčín.)

PLZEŇ, kunvenoj ĉiu vendrede en nova klubejo, Anglický Dvůr, Palackého nám. Ĉiam de la 19a horo.

GRAVA HISTORIA DOKUMENTO

estos la jarkolekto de la PACDEFENDANTO 1955, ĉar en ĝi respeguliĝas la tuta procedo de la naskiĝo de Esperantista Pacmovado enla Popol-demokratioj kaj Sovjet-Unio, la preparoj kaj la aranĝo de nia unua Tutŝtata Konferenco kaj aliaj historionfarantaj okazintaĵoj. Kompletan jarkolekton vi povas jam nun mendi ĉe nia redakcio kontraŭ sendo de 12,- Kčs aŭ 10 int. resp. kuponoj.

INTERŜANĜE VI POVAS RICEVI

de viaj japanaj korespondantoj la jenajn valorajn verkojn, kiujn ĵus eldonis: JAPANA ESPERANTO LIBRO- KOOPERATIVO, Nakacu-hamadoori 2-20 Oojodo-ku, OSAKA, Japanio:

"KUN LA KADAVRO DE L' EDZINO" estas travivaĵo el Hiroŝima kun 8paĝa ilustraĵo de Akamacu kaj Maruki.

"HIROŜIMA": fotoalbumo, faktoj nepublikigitaj pro severa cenzuro. Nu ili klare montras severe konservitaj fotografioj.

"INFANOJ DE L' ATOMBOMBO", raportoj de infanaj travivaĵoj el Hiroŝima.

"LA ĈASTECO DE JAPANIO", Rezultoj de l' faŝismo. Japanaj virinoj perdas sian ĉastecon kaj fariĝas viktimoj de la okupantoj (41paĝa).

"FOTONO ĈE JUĜEJO": S. Tomonaga, la plej talenta japana teorifizikisto raportas pri sia teorio en fabelsimila metodo (39paĝa).

"HO L' ATOMBOMBON NE LASU PLU NI!" kanto kun muziknotoj. Kantata tra la tuta mondo (poŝtkarto).

"GAUCHE LA ĈELISTO", scenario de pupa teatro, eble sola tiaspeca en la Esperanto-literaturo.

KIEL APERAS NIAJ GAZETOJ

Tiu ĉi n-o malfruiĝis pro manko de papero kaj mono. Ankaŭ la vizito de k-do Murgin en Plzeň parte kulpas kaj la distribuado el Kopřivnice ne bone funkcias. Ni esperu, ke ek de 1956 ĉio pliboniĝos.

"PACO" la novembra n-o, kiun eldonas Bulgario, verŝajne ankaŭ malfruiĝis. La decembra eldoniĝos en Aŭstrio.

LASTA NOVAĴO

"MEM" havas jam peranton en Sovjetio.

K O R E S P O N D I D E Z I R A S

K-do Josef ESPENDR, Javornice 121, Okt. Rychnov n.Kněž. Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj

K-do Karel KOTRBA (19jara studento de medicino), Rumunská 11, Liberec, Ĉeĥoslovakio, pri medicino, literaturo kaj filmo

K-do Oldřich KNÍCHAL (16jara stud), Barčianská 96, Košice, Ĉeĥoslov. pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj

K-do Jaroslav RYGEL, Nové svobodárny ½, Ostrava-Habrůvka, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ. landoj per il.p.k. kaj interŝanĝi literaturon pri sorĉarto.

K-do N.At. KOLOVSKI, Zehĉevo-Mihajlovgrad, Bulgario, serĉas korespondantojn por sia Esprondeto "Frateco".

K-do Johan FETOTOV, Str. Vokzalnaja 134 lgr. Kujbiŝev, obl. Sovjet-Unio, laboris en 1920-1937 ĉe Labintrel, Turksib-fervojo, kie li kontaktiĝis kun multaj germanaj k-doj. Li dezirus kun ili renovigi kontakton. Bonvolu helpi.

K-do MODESTO Urban, Oktjabrskaja 4, 46, Moskvo I-18, Sovjet-Unio, kun ĉiuj landoj. Certe resp.

ADRESŜANĜO: K-do SOKOLOV Boris Ivanoviĉ, loĝas nun: Str. Lenina n-o 34, Zdoblbunovo, Rov. Sovjetio.

"PACO"-Esperanto-Rondo, Petöfi Kulturdomo, Hodmezövásarhely, Hungario, aranĝos la 30/12 pacvesperon. Sendu multnombre salutojn kaj raportu pri via landa porpaca laboro.

PACO ESPERANTO RONDO-BUDAPEST, 5. Kulturhejmo, Engelstér. Hungario, petas materialojn, gaz.revuojn ktp. por ekspozicio okaze de Zamenhof-festo la 15/12an.

K-do E. DIN, Ching Foong Cotton Mill Chow San Fang, WUSIH, Kiangsu, Ĉinio, kun ĉiuj landoj por por lingve perfektiĝi. Pri tekniko de ŝpin- kaj teks-ado.

K-do Georgi ĈAKAROV, Str. Struma 18, Burgas, Bulgario, (25j studento) interŝanĝas p.m. kaj divers. objektojn.

K-do Karl KVIST, Box 109 A, DEJF, Svedio, intencas aranĝi lumbildparoladon pri la Tutŝtata Konferenco en Otrokovice. Li petas ĉiujn fotoamatorojn sendi siajn produktojn baldaŭ al li.

ADRESŜANĜO: K-do Franz TISCHER, loĝas nun en Martinstrasse No. 9, MAGDEBURG-Buckau (19b), German. DDR.

ESPERANTO ESTRADO "FLAMO", Bulv. Stalin 40, SOFIO, Bulgario, ĵus fondiĝinta bezonus por sia programo humoraĵojn kaj ŝercojn, de multaj nacioj. Ni rekompecas per samspeca bulgara materialo.

K-do Emil POLICKÝ, stud. de maŝin-inĝeniero, Ul. Febr. víťazstva,VŠD, J/305, BRATISLAVA, Ĉeĥoslovakio, Let. kaj il.p.k. kun ĉ. landoj.

K-ado Tibor TARDOS (verkisto), ĉe Magyar Irok Szövetsége, VI. Gorkij-fasen 10, BUDAPEST, Hungario, deziras ligi kontakton kun ĉiulandaj verkistoj kaj interŝanĝi literaturon.

.................................................................................................................................................

<u>MUNICIO POR NIA BATALO</u>:

| | |
|---|---|
| K-do prof. Brožík-Sušice | 5,- Kčs |
| K-do J. Espendr-Javornice | 7,- " |
| K-do inĝ. J. Kochman-Praha | 27,- |
| K-do R. Hromada-Praha | 14-, |
| K-do R. Lipka-Karviná | 7,- |
| Esperantisto Slovaka | 15,- |
| K-do A. Paul-Horš. Týn | 10,- |
| K-do J. Řehoř-Ostrava | 10,- |
| K-do Fr. Svačina-Lanžhot | 10,- |
| K-do J. Štachr-Pardubice | 2,- |
| K-do Fr. Lička-Ostrava | 2,- |
| K-do R. Janečka-Lípová | 1,- |
| K-do Vl. Malý-Hořice v Pod. | 5,- |
| K-do K. Kotrba-Malešice | 5,- |
| K-do M. Houdek-Kunvald v Č. | 50,- |
| K-do V. Kaplánek-Mar.Lázně | 6,- |
| K-do d-ro Kamarýt-Chotěboř | 10,- |
| K-do A. Zmeškal-Praha | 2,- |
| Esp-rondeto-Otrokovice | 50,- |
| K-do O. Kníchal-Košice | 8,- |
| K-do J.Ešpandr-Javořice | 10,- |
| K-do J. Pátek-Holešov | 4,- |
| K-do Fr. Lička-Ostrava | paperon. |
| K-do B.Horák-Přerov | 1,- |

Ĉiuj akceptu niansinc. dankon.

LETERPAPERO kaj poŝtkarto kun packolombino, teksto "PER ESPERANTO POR LA MONDPACO" (ĉsl. eldono) mendu ĉe k-do Jos. Reiser, Krajská správa spojů, Tylova ul. PLZEŇ

Ĉe nia redakcio vi povas abonpagi Bulgaran bultenon de Esp-pacdefendantoj kaj bultenon deEsp-Asocio en Polio kontraŭ pago de 13,- Kčs. Same ankaŭ kvaronjar. bultenon "ĈERIZO", eldonitan de la Virina Esp. Asocioen Osaka por 5,-.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx
Eldonis: Závodní klub ROH, odbor ESPERANTO, TATRA, n.p. KOPŘIVNICE
Redaktis: K-do Rudolf BURDA, Palackého nám. 6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx